

# AKADEMIO INTERNACIA DE LA SCIENCOJ

Accademia  
Internazionale  
delle Scienze

International  
Academy  
of Sciences



San-Marino

Internationale  
Akademie der  
Wissenschaften

Académie  
Internationale  
des Sciences

## Invito al kunsido de la Ĝenerala Asembleo de la Scienca Sektoro de AIS kaj de la membraro de IAW (AIS Germanio)

2014-09-06 (sabato), 13h00 / 13:00 Uhr  
Budapest (HU), Andrássy-Universität, Pollack Mihály tér 3

**Invito** al membrarkunveno de AIS – Internationale Akademie der Wissenschaften (Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino) e. V. kaj al kunsido de la Ĝenerala Asembleo de AIS je sabato, 2014-09-06, 13:00 – 14:00 en la ejoj de la Andrássy-Universitato, Pollack Mihály tér 3, 1088 Budapest, Hungario.

### Tagordo:

1. Formalajoj (kvorumeco, voĉrajto, protokolo, tagordo)
2. Ĝenerala kaj financa raportoj
3. Senŝarĝigo
4. Buĝeto 2014
5. Decidoj pri ŝanĝoj en la agado kaj strukturo de AIS
6. Decido pri proponoj el tagordero 1
7. Konfirmo de la elektaj dum SUS 32 je 2011-10-01 (senato, prezidanto)
8. Diversaĵoj

**Einladung** zur ordentlichen Mitgliederversammlung der AIS – Internationale Akademie der Wissenschaften (Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino) e. V. (vormals AIS Deutschland e. V.) sowie zur Vollversammlung des wissenschaftlichen Sektors der AIS am Samstag, 06. September 2014, 13:00 – 14:00 Uhr in der Andrássy-Universität, Pollack Mihály tér 3, 1088 Budapest, Ungarn..


### Tagesordnung:

1. Formalien (Beschlussfähigkeit, Stimmrecht, Protokoll, Tagesordnung)
2. Allgemeiner Bericht, Kassenbericht
3. Entlastung
4. Wirtschaftsplan 2014
5. Entscheidungen über Änderungen in der Tätigkeit und der Struktur der AIS
6. Entscheidung über Anträge aus TOP 1
7. Bestätigung der Vorstandswahlen vom 1.10.2011 (SUS 32)
8. Verschiedenes

Vieno / Wien, 2014-08-10, OProf. Hans-Michael Maitzen

Jen mapeto pri la situo de AUB en la centro de Budapešto. Ĝi estas nura skizo kaj montras nur iom gravajn stratojn. Ne dependu nur de ĝi por via orientigo.

Kiel vi vidas, AUB estas bone atingebla de la metroaj stacioj *Astoria* (linio 2) kaj *Kálvin tér* (linioj 3 kaj 4).



**Novjara letero de la prezidanto de AIS,  
OProf. Hans Michael Maitzen**

Tre estimataj membroj kaj anoj de la Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San Marino,

mi salutas vin okaze de la baldaŭa novjara festo de nia fondolando San-Marino kaj dezi ras al vi ĉion bonan.

En la pasinta decembro grava perdo trafis nin: forpasis nia fondinto, multjara prezidanto kaj honora prezidanto OProf. Dr. habil. Helmar Gunter Frank. AIS neniam forgesos, ke sen li tiu unika akademio ne ekzistus.

Certe vi rimarkis, ke por la nuna jaro 2014 AIS ne anoncis studad-sesion; fine de majo tamen okazis preleg-sesio en Sibio-Hermannstadt, kiun organizis niaj rumanaj kolegoj EProf. Dr. Sara Konnerth kaj Dr. Cristina Tanc. Aperis presita volumo kun la sesiaj kontribuoj; per video-konferenco partoprenis anoj de nia partnera institucio WSZ-SW en Varsovio. La ĉefa salono de la sesio portis la nomon de OProf. Helmar Frank, por memori lian forpason. Raporton vi povas trovi kiel kutime en nia ret-paĝaro [wwwais-sanmarino.org](http://wwwais-sanmarino.org).

Por plenumi legajn devojn kaj prezenti al vi, niaj membroj, nian laboron, ni invitas al kunkveno de la Ĝenerala Asembleo en Budapešto, kie la germanlingva Andrassy-Universitato disponigas al ni kunvenejon. Se vi ne povas persone partopreni, bonvolu sendi al ni viajn ideojn kaj proponojn pri la estontaj agadoj kaj evoluo de AIS.

Pro eraro en la protokoloj de la kunsidoj dum SUS 32 (en 2011) necesas oficiale konfirmi la tiamajn elektojn (vidu eron 7 en la tagordo en la invitilo).

En 2015 AIS devos elekti novan senaton. Jam antaŭ la elektoj de 2011 la tiama senato atentigis, ke la aktivuloj de AIS ne plijuniĝas kaj ne povos multe pli longe teni nian akademion viva. Tiu situacio ne pliboniĝis en la pasintaj jaroj. Tial ni alvokas vin aktiviĝi en AIS aŭ fari proponojn pri la daŭrigo de nia aktivado en alia formo. La nunaj estroj ne povos daŭrigi la aktivadon en la nuna formo pliajn kvar jarojn.

Sub la tagordero 5 nia ĜA diskutos pri ŝanĝoj, kiuj ebligos al AIS pluekziston kaj faros necesajn decidojn, ankaŭ por prepari eventualajn regularaĵojn je la sekva ĜA-kunsido.

Mi sincere salutas vin kaj ĝojus renkonti vin en Budapešto komence de septembro.

**Neujahrsrundbrief des AIS-Präsidenten OProf.  
Hans Michael Maitzen**

Sehr geehrte, geschätzte Mitglieder und Angehörige der Internationalen Akademie der Wissenschaften (AIS) San Marino,

ich grüße Sie anlässlich des bevorstehenden Neujahrstages unseres Gründungslandes San Marino und wünsche Ihnen alles Gute.

Im vergangenen Dezember hat uns ein schwerer Verlust getroffen: Unser Gründer, langjähriger Präsident und Ehrenpräsident OProf. Dr. habil. Helmar Gunter Frank ist verstorben. Die AIS wird nie vergessen, dass es diese einzigartige Akademie ohne ihn nicht gäbe.

Sicherlich haben Sie bemerkt, dass die AIS für 2014 keine Studientagung angekündigt hat; allerdings hat Ende Mai in Sibiu-Hermannstadt eine Vortragskonferenz stattgefunden, die von unseren rumänischen Kollegen EProf. Dr. Sara Konnerth und Dr. Cristina Tanc ausgerichtet wurde. Die Beiträge erschienen in einem gedruckten Tagungsband; Mitarbeiter unseres Partnerinstituts WSZ-SW in Warschau konnten über Videokonferenz teilnehmen. Der Tagungssaal trug zum Gedenken an OProf. Helmar Frank dessen Namen. Einen Bericht finden Sie wie üblich in unserem Netzauftritt [wwwais-sanmarino.org](http://wwwais-sanmarino.org).

Zur Erfüllung gesetzlicher Pflichten sowie um Ihnen, unseren Mitgliedern, unsere Tätigkeit vorzustellen, laden wir zu einer Mitgliederversammlung nach Budapest ein, wo die deutschsprachige Andrassy-Universität uns einen Versammlungsraum zur Verfügung stellt. Wenn Sie nicht persönlich teilnehmen können, senden Sie uns bitte Ideen und Vorschläge zur künftigen Tätigkeit und Entwicklung der AIS.

Infolge eines Fehlers in den Sitzungsprotokollen von SUS 32 (2011) ist eine offizielle Bestätigung der damaligen Wahlen notwendig; siehe hierzu Tagesordnungspunkt 7 in der Einladung.

2015 muss die AIS einen neuen Senat/Vorstand wählen. Bereits vor den Wahlen 2011 hat der damalige Senat darauf hingewiesen, dass die Aktiven der AIS nicht jünger werden und unsere Akademie nicht mehr lange am Leben erhalten können. Diese Lage hat sich in den letzten Jahren nicht verbessert. Daher rufen wir Sie auf, aktiv in der AIS mitzuarbeiten oder Vorschläge zu machen, in welcher anderen Form sie ihre Tätigkeit fortsetzen kann. Der jetzige Vorstand kann nicht noch vier Jahre weitermachen.

Unter dem Tagesordnungspunkt 5 wird die Versammlung über Änderungen diskutieren und nötige Entscheidungen treffen, auch um etwaige Änderungen in den Regularien bei der nächsten Mitgliederversammlung vorzubereiten.

Ich grüße Sie herzlich und würde mich freuen, Sie im September in Budapest zu treffen.

Vieno / Wien, 2014-08-10

OProf. Hans Michael Maitzen, prezidanto de AIS San Marino

## Kelkaj utilaj esprimoj en la hungara lingvo

Esperanto	Hungara	Proksima prononco
jes	igen	igen
ne	nem	nem
bonan tagon!	jó napot (kivánok)	jo: npot
bonan vesperon!	jó estét (kivánok)	jo: ešt
bonan apetiton!	jó étvágyat	jo: e:tva:djt
bonan nokton!	jó éjszakát	jo: ejška:t
saluton!	szervusz	servus
ŷis revido!	viszontlátásra	visontla:ta:srp
pardonu!	bocsánat	boča:npt
pardonu la ŝenon	bocsánat a zavarásért	boča:npt v zavvra:še:rt
mi petas	kérem	ke:rem
dankon!	köszönöm	køsønøm
ne dankinde	szivesen	sivešen
mi ne komprenas	nem értem	nem e:rtem
kie estas . . .	hol van . . .	hol vñ
necesejo	vécé, WC	ve:ce:
- por virinoj	női vécé	nøi ve:ce:
- por viroj	férfi vécé	fe:rfi ve:ce:
restoracio	éfterem	e:terem
gastejo	vendéglő	vende:glø:
akvo	víz	vi:z
mineralakvo	ásványvíz	a:šva:njvi:z
teo	tea	tep
kafo	kávé	ka:ve:
biero	sör	šør
vino	bor	bor
la manĝoliston	az étlapot	vz e:tløpot
mi ŝatus pagi	fizetek, kerek	fizetek kerek
stacidomo (fervoja)	pályaudvar	pa:jø-udvør
haltejo	megálló	mega:llo:
helpon!	segitséget!	šegitše:get

Specialaj literoj en la hungara estas la kornaj vokaloj; korno longigas (kaj fermas) vokalon. La senkorna "a" (v) estas tiom malferma, ke al multaj nehungaroj ĝi sonas preskaŭ kiel "o". Ankaŭ la "umlaŭtoj" ö kaj ü havas kornajn variaĵojn ĉe kaj ū. "ö" kaj "ü" sonas kiel en la germana kaj la turka: "ö" estas prononcata inter o kaj e, "ü" estas prononcata inter i kaj u.

Kelkaj litergrupoj havas specialan prononcon kaj apartan lokon en la alfabeto:

- cs – prononcata kiel č
- gy – prononcata kiel dj, kun la lango ĉe la palato
- ly – prononcata kiel j
- ny – prononcata kiel nj, kun la lango ĉe la palato
- sz – prononcata kiel s
- ty – prononcata kiel tj, kun la lango ĉe la palato
- zs – prononcata kiel ž

Multaj konsonantoj estas prononcataj kiel en Esperanto; aparte lernendas:

- s – prononcata kiel š
- y – prononcata kiel mallonga i